

# Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika  
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

## EN SONGŬO

Estis iam . . . tiel komenciĝas fabelo ; kaj tian mi ankaŭ hodiaŭ rakontos, fabelon, kiu aperis al mi en songo. Ĉu vi konas, karaj gelegantoj, la senton de flugado, de maligiĝo de l' teraltiro, kiam multkoloraj bildoj ĉirkaŭas vian dormon ? Estas mirinde facila svingado super la devigantaj, limigantaj zorgoj de l' ĉiutago, ŝajne senplana traglitado de loko al loko, tra ŝarĝiĝantaj scenaroj, kvazaŭ disiĝis korpo kaj animo. La lasta komencas altan flugadon por rigardi de supre malsupren tion, kion la homa neeblo al ni malhelpas ekkoni, kaj por tramigradi la senliman mondon de idealoj, de neplenumitaj deziroj. . . .

Venu, mi vin gvidos. Ni estas supreniĝintaj kaj kondukas nian flugadon al granda urbo, kiu tie malproksime ĉielen altigas siajn preĝejturojn. Larĝega rivero etendiĝas sub niaj piedoj, sed la flugiloj de l' songo nin facile portas transen, kaj tiam la domaro de grandurbo prezentas sin al niaj okuloj. Kien ni celas ? Mi nescias ; lasu ni tion al la sorto, ke ĝi montru al ni la celon de niaj sopiroj. Mi vidas altan, vastan domon meze de parksimilaj ĝardenoj ; mi malsupreniĝas, ĉar estas fenestro, kiu altiras la atenton. Ĉe la malhela fundo de la ĉambro staras kvazaŭ songante, la formo de junulino. La malleviĝanta suno teksas magiajn lumojn ĉirkaŭ ŝiaj konturoj kaj briligas ŝiajn riĉajn harojn kiel ŝpinita oro. Mi povas distingi ĉian trajton de la dolĉa vizaĝo, la okuloj sopireme rigardas malproksimen, kvazaŭ ŝi atendas iun venontan. Nenia bruo interrompas la vesperpacon, nur la mallauta kanto de najtingalo trasonadas. La junulino nescias mian ĉeeston ; la sorĉa ĉapo de l' songo malvidebligas min al ŝi. Mi glitas inter ŝi kaj la fenestr-

ingo en la ĉambron. Sur la tablo kuŝas io blanka ; ĝi estas letero al ŝi adresita. Scivoleme mi rigardas la surskribon : « Mia karega Manjo ! » Jen do ŝia nomo ! Kontraŭvole miaj lipoj formas la vorton kaj kvazaŭ mi ĝin elparolis, la junulino returniĝas, sed ĉar ŝi neniun vidas, jam estas sin deturnanta, kiam ŝia rigardo trafas la malfermitan leteron. Ŝi manprenas ĝin, nesciante kion fari, kaj tiam ĉirkaŭvidinte, ĉu ŝi ne estas observata, kun pasia gesto premas la kisindajn lipojn sur la skribaĵon. Konjektante la veron, mi jam alproksimiĝas por almenaŭ deĉifri la surskribon, kaj... jen... jen... malsupreniĝas densa, griza nebulmuro inter ŝi kaj mi, necerta sento de falado min kaptas, kaj... mi vekigiĝas.

Nokta mallumo ĉirkaŭas min ; malproksime iu horloĝo batas la duan. Mi levigiĝas kaj rigardas tra la fenestro : ĉie ĉirkaŭe la lasta marto-neĝo. Do ĉio estis nur sonĝo kaj nenia matura somerfeliĉo ! Sed vin mi dankas, benata horo ! vi vidigis al mi sanktejon, kiu kuŝas plej profunde en mia koro, kaj estontecon, al kiu kliniĝas ĉiuj miaj pensoj. La realeco postulas ĝian rajton ; mi plenumu pli gravajn devojn de l'vivo kaj mondo. Sed la sonĝon mi neniam forgesos.

HANS SENGEROB.

---

## Mia lir'.

Rompita mia lir', finita kant' malgaja,  
Ĉifita bela flor', karega memoraj' !  
Ornamo de l' ĝarden' en bela tago maja,  
Konsolo por anim' por koro la sanktaj' !

Mi iris al fenestr'... El kampo vent' libera  
Enflugis... ĵen, kun bru' ekfalas la kandel'.  
Mi pensis pri la am', pri vivo, mond' mizera  
Kaj tie en ĉiel' briladis ora stel'.

Mi pensis... tra l'aer', el fund' de l'nokto bela  
Alflugis ia voĉ'... vekigiĝis mia kor' :  
La revoj flugis for, efektivec' malhela  
Revenis, kaj kun ĝi turmentoj kaj dolor'.

Mi levis min kun pez'... el brusto la sopiro  
Eliris kaj sen bru' ekstremis en aer' !...  
Rompita mia viv', silentas mia liro,  
Mi mortas sen konsol', sen amo, sen esper' !

ADOLF ZELENAY.

## PRI LA OPTIKA INTERKOMPRENIĜO

per nur 17 depeŝsignoj Morse'aj.

« Kio estas klara, tio povas esti nekorekta,  
sed neniam malbona. » Prof. TH. CART.

Konata afero estas, ke la militistaro, — precipe en mont-regionoj, kie ofte maleble estas establiĝi metalfadenan telegraf-ilon, — uzas por interkomunikiĝo la depeŝsignojn Morse'ajn, kiujn oni *optike* signalas: nokte per lampo, tage per standardo, aŭ alia, ĝis malproksime videbla objekto.

Per la signilo donita mallonga (resp. longa) signo oni signalas la signelementon *punkto* . (resp. *streko* —).

Ĉiu povas eniĝi en izolitan situacion, kie oni kun granda profito povas tiamaniere uzi la depeŝsignojn.

Dezirinde estas do, ke ili estu ĝenerale konataj.

Se vi volas facile ellerni kaj en la memoro daŭre konservi la Morse'ajn depeŝsignojn, lernu ilin memortehnike.

Ĉiufoje, kiam vi volas depeŝi ekzemple la literon *b*, memoru pri la vorto « belulino ». En tiu ĉi rememoriga (stereotipa) vorto la vokalo « e » reprezentas la Morse'an signelementon *streko* (—), kaj la *ceteraj vokaloj* la signelementon *punkto* (·).

La rememoriga vorto « belulino » daŭre restas en via memoro, ĉar ĝi komenciĝas je la sama litero (*b*), kiun vi intencas depeŝi.

Vi do scias jam la Morse'an depeŝsignon de la litero *b*: ĝi estas (— . . .) — Tute same uzeblaj rememorigaj vortoj estas la jenaj:

ame (· —) <i>a</i>	meze (— —) <i>m</i>
belulino (— . . .) <i>b</i>	nevo (— ·) <i>n</i>
centimetro (— . . .) <i>c</i>	(— — —) <i>o</i>
(·) <i>e</i>	ripeti (· — ·) <i>r</i>
humiligi (. . . .) <i>h</i>	simili (. . .) <i>s</i>
iri (· ·) <i>i</i>	tre (—) <i>t</i>
(jarcentmeze) (· — — —) <i>j</i>	unue (· . —) <i>u</i>
kreskante (— —) <i>k</i>	vizitinte (. . . —) <i>v</i>
loterio (· — .) <i>l</i>	

[Tiaspecajn rememorigajn vortojn ĉiu mem povas krei en sia nacia lingvo, tiamaniere disvastigante la konon de la depeŝsignoj, ekz. en la *germana* lingvo, kie la duobla vokalo *ei* reprezentas la Morse'an signelementon streko: « Arbeit » (· —) *a*, « Verlegenheit » (. . . —) *v*; en la *hungara* lingvo la supersignitaj vokaloj reprezentas la strekon: « acél » (· —) *a*, « vasutiór » (. . . —) *v*.]

*Antau ol montri, ke chi-subrai 17 literoi, respektive iliai tebesh-siknoi, suvichas bor tute klare kai kombreneble esbrimi niain bensoin ber vortoi kai literciveroi : ni volas atentiki, kiamaniere oni boras iun ain tebeshon ricevitan — ech sen scio de la tebeshsiknoi — rabite techivri.*

Por tio, anstataŭu en la ricevita depeŝo la signelementon punkto (.) per « 1 » kaj la signelementon streko (—) per « 4 », tiel :

$\begin{array}{cccccccc} \dots & \cdot & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots \\ 111 & 1 & 41 & 4 & 114 & 44 & 11 & 14 & 41 \\ \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots \\ 4111 & 4111 & 14 & 414 & 14 & & & & \\ \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots & \dots \\ 1444 & 1111 & 444 & 41 & & & & & \end{array}$

<i>Por koncepti kaj deĉifri la depeŝon, oni uzu tiun ĉi tabelon :</i>		
1 = e (ä, é, ö)	111 = s (z, 5)	1114 = v (w, f, 7)
4 = t (d, 1)	114 = u	1411 = l ( <i>kaj 0 nulo</i> )
11 = i (ü, j, y)	141 = r (4)	1444 = j (y)
14 = a (á, à)	414 = k (g, ck, 9)	4111 = b (p, 6)
41 = n (2)	444 = o	4141 = c
44 = m (3)	1111 = h (ch, 8)	q = kv, x = ks, ñ = nj.
ĉ = ch, ĥ = hh, ŝ = sh, ĝ aŭ ĵ = jh.		
Nur se la literŝanĝe esprimata vorto povus okazigi malkompreniĝon, uzu ĉi-subajn literbildojn :		
ae (= ä), aa (= á aŭ à), ee (= é), oe (= ö), ue (= ü).		
tt (= d), vv (= f), kk (= g), bb (= p), ss (= z).		

La intenco interkomunikiĝi per nur 17 literoj baziĝas sur la deziro, ke ĉe la optika depeŝado, — kie la signoj sin ne fiksas sur paperon, — la depeŝantoj praktiku kun nur malmultaj memsamaj, kaj eĉ kun kiel eble plej mallongaj signoj.

Mi asertas, ke la multnombro de la literoj, krom tio la dek cifersignoj, plue la interpunkcio kaj servosignoj (la du lastaj kunmetitaj neregule el pli ol 5 signelementoj) okazigas, ke nuntempe la telegrafistoj, praktikante kun tro multaj diversaj kaj longaj Morse'aj signoj ĉe la metalfadena kaj optika depeŝado, neelporteble ofte eraras.

Tial do mi proponas koncepti kaj depeŝi laŭ la supra tabelo, rimarkante la jenojn :

a) La vortoj kritikaj, t. e. la vortoj, buŝe facile konfuzeblaj, ekzemple : *pakaĵo* (bakaĵo), *pezilo* (pesilo), *atendi* (atenti), *sendi* (sendi), nur tiam estu nepre esprimataj per « bbakajho », « bessilo »,



« atentti », « sentti », se ili ne estas en interligo de la frazo, t. e. se la frazo per si mem ne difinas la precizan signifon de la kritika vorto.

Ekzemple, en la frazo : « sentu bbakajhon » la frazo per si mem difinas la precizan signifon de la vortbildo « sentu », sekve oni ne uzu la vortbilon « senttu » ; kontraŭe la vorto « pakajo » devas esti distingata de la vorto « bakajo » per la vortbildo « bbakajho », ĉar la senco en tiu ĉi duvorta frazo ne difinus la precizan signifon de la vortbildo « bakajho ». Unuvorte, tiu ĉi lasta vortbildo estus duba, eĉ se la cirkonstancoj al la adresato klarigus, ĉu la parolo estas pri pakajo aŭ bakajo (\*).

b) Por ekstrema bezono, la literciferojn de la Morse'a alfabeto mi lasis netuŝitaj, por povi, se nepre necese, tute korekte esprimi per ili ĉiun en ĝi enhavatan literon :

ä . . . .	á aŭ à . . . . .	ch — — — —	d . . . .
é . . . . .	f . . . . .	g — — —	ñ — — — —
ö — — — —	p . . . . .	q — — — —	ü . . . . .
w . . . . .	x — — — —	y — — — —	z — — — —

c) La ciferojn oni esprimu per literciferoj, tiel :

1 = t, 2 = n, 3 = m, 4 = r, 5 = s, 6 = b, 7 = v, 8 = h, 9 = k, 0 = l.

(La literciferoj estas unuavide ellerneblaj memorteĥnike : oni nur atentu, ke la literojn *t*, *n*, *m* oni skribas per 1, 2, 3 dikaj strekoj ; plue, ke ekzistas formo de la litero *r* manskribita « iom similanta al la cifero 4 ; la literoj *s*, *b* similas al la ciferoj 5, 6 ; la litero *f* similonanta al *v* havas kvazaŭformon de la cifero 7 ; la germana manskribita *h* tre similas al la cifero 8, cetero, ĝi estas komenclitero de la franca vorto « huit » = ok, konata de ĉiuj poŝtistoj kaj telegrafistoj de la tuta mondo ; la *g* similonanta al *k* tute similas al la cifero 9 ; fine, la manskribita *l* entenas en si la formon de 0.)

Ekzemploj : tmr homoi alvenis. — sentu mtt mm ta karbonajo. — tirkestetoi siknitai ie nro s kai litero s malblenai. — ekmarŝo morkau r matene.

(\*) La klarigan efikon de la cirkonstancoj je la teksto de depeŝoj atestas la jena okazo. En la militiro de 1870—71 oni volis komprenigi per metalfadena telegrafado : « heute NICHT angreifen » (= hodiaŭ ne ataku), kaj la adresato ricevis la depeŝon tiel : « heute NACHT angreifen » (= hodiaŭ nokte ataku). Malgraŭ tio, ke la depeŝo estis tute klara, la cirkonstancoj absolute nekonvenaj igis la adresaton demandi : fu oni ataku ? La erara sciigo en tiu ĉi okazo devenis verŝajne de tio, ke unu el la koncernaj telegrafistoj, aŭdinte jam pli frue, ke oni intencas ordoni la noktan atakon, sugeste laboris kaj erare depeŝis respektive deĉifris la vorton « Nacht » anstataŭ « nicht ».

d) La Morse'ajn cifersignojn, tiamaniere superflujajn, oni uzu kiel servosignojn kaj signojn distingajn, tiel :

. . . . . Plibonigu la signaladon !  
 . . . . . Atendu !  
 . . . . . Ripetu la depeŝon de komenco ĝis fino !  
 . . . . . *Tie ĉi* : Fino de la depeŝo.  
           *Transe* : Akceptita depeŝo tute komprenata.  
 . . . . . Alvoko.  
 . . . . . .  
 . . . . . +  
 . . . . . = aŭ — } en la depeŝkoncepto oni penu  
           :                   } eviti tiujn ĉi signojn;  
           /                   } ili ĝenas la depeŝadon

Ĉe la optika depeŝado oni apartigas ĉiun vorton, sole starantan ciferon kaj cifergrupon — per aparta signo ; pro tiu ĉi celo plej taŭga ŝajnas la Morse'a ltersigno *w* (. — —), ĉar, — krom propraj nomoj, — apenaŭ ekzistas vorto finiĝanta per *w*. Oni depeŝu do ekz. : « sentuw bbakajhonw ». Kaj la apartiga signo *w* devas esti redonita de l'akceptanto post ĉiu akceptita vorto (aŭ cifergupo) por sin konvinki, ke nenio evitis la atenton.

Krom ĉi-supraj signoj oni devas uzi la signojn jenajn :

(*k*) . . . = Komencu depeŝi ; mi estas preta por preno !

..... (8 punktoj rapide signalitaj) :

*Tie ĉi* : Mi eraris ; mi ripetos la lastan bone depeŝitan vorton (cifergrupon).

*Transe* : Mi eraris ; ripetu la lastan, de mi jus interrompitan vorton (cifergrupon).

... Nia vigla junularo bonrezultate povus eksperimenti la uzadon de la jene pritraktita depeŝa metodo, ekzemple, je okazo de ekskursoj. Certe tiu ŝajna ludo ne nur distras kaj amuzas, sed ankaŭ utilas.

La celo de jena mia studo estos atingita, se la junularo, por

. . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .  
 . . . . .



## REGIDO-ĜIBULO

Fabelo, de A. V. STERN.

Sola filo-tronheredonto de gereĝoj atingis la aĝon de dekunu jaroj; el patrinaj manoj la reĝido transiris al pli severaj zorgoj de viroj-edukistoj. La bela infanĉambro, kun rozkoloraj silkaj drapiraĵoj, staris malplena, la kesto kun ludiloj estis fermita kaj forportita en la subtegmenton.

La reĝino komencis enui.

Tage kaj nokte ŝi revis nur pri malgrandaj, etaj infanoj.

« Filon, — petis ŝi de Dio, — malgrandan filon donu al mi! »

Ŝi revis pri roza lanuga korpeto de l' infano, alpremiĝanta al ŝi, pri malgrandaj piedetoj kaj manetoj, pri buŝeto, suĉanta ŝian mamon.

Kaj jen unufoje ekvidis ŝi en sonĝo bonan genion, vestitan per blankaj lumaj vestaĵoj, kun vizaĝo brilanta; li aliris al ŝi kaj diris:

— Vi mem ne scias, kion vi petas.

— Mi petas feliĉon. Ĉu ne estas plej alta feliĉo por la virino, alpremi al sia brusto etan filon?

— Sed ĉu vi povos doni feliĉon al la filo?

— Jam nun mi amas lin senmezure, mi fordonos por li mian vivon, tuta ĝi estos al li dediĉita.

— Sed kiel vi povas scii, en kio estas lia feliĉo? Ĉu vi povas forpeli de li danĝerojn? antaŭvidi okazajn mal-feliĉojn?

— Per ama instinkto mi ekscios pri danĝeroj kaj forpelos ilin. Vi ne scias, kiom da patrino mildeco entenas mia animo. Ho, sendu al mi malgrandan fileton!

La vizaĝo de l' bona spirito malheliĝis.

— Estu, kiel vi volas, — diris li.

La reĝino vekigis en larmoj, sed feliĉa.

Baldaŭ ŝi naskis filon.

Ŝi nomis lin Dezirito kaj al li fordonis ĉiujn siajn zorgojn, tutan sian amon.

La reĝo-edzo, la reĝido-heredonto kvazaŭ formovis sin ien malproksimen kaj nur la etulo-filo regis la sentojn de l' reĝino.

Sed jam en la unuaj tagoj ŝi devis seniĝi de la plej

dolĉa patrino zorgo : ŝi ne povis mem mamnutri la infanon, ĉar en ŝiaj mamoj forestis lakto, kaj, plena je ja-luzo kaj envio, la reĝino dungis nutristinon.

Tamen, konfidante nek al la vartistino, nek al la nutristino, la reĝino ĉiam atente gardis la infanon : plej malgranda ekmovo aŭ krieto de l' filo, — tuj ŝi mem kuris al li, zorgeme elprenadis lin el la lulilo, kaj, metinte al la brusto de l' nutristino, ne deflankigis sian rigardon de la reĝido, dum la fremda virino lin mamnutris.

Sed unufoje, lacigita de siaj patrinaj zorgoj, la reĝino ekdormis tiel forte, ke ŝi ne atentis la vekigon de l' filo, kaj la vartistino, ne volante ŝin veki, mem elprenis Deziriton el la lulilo kaj zorgeme metis lin sur la genuojn de la nutristino.

Kaj ambaŭ, la vartistino kaj nutristino, ekdormetis, la manoj de l' nutristino malfortigis, ŝi ne detenis la infanon kaj li falis sur la plankon.

La reĝinon vekis lia ploro, sed la infano jam kuŝis en la lito kaj la timigitaj servistinoj nenion diris al la reĝino pri la malgaja okazaĵo.

Sed post kelka tempo oni rimarkis, ke la malgranda reĝido kripliĝis : li havis ĝibon sur sia dorso.

La malĝojo de la patrino estis tiel senmezura, kiel ŝia amo al la infano.

En tiu malproksima epoko la kuracistoj ne kuraĝis ankoraŭ rektiĝi ĝibajn dorsojn, tial la malgrandan reĝidon oni ne turmentis per operacioj. Sed la reĝino riproĉis al si, ke ŝi estas kulpa en la malfeliĉo de l' filo, ŝi ne sufiĉe zorgis pri li, ŝi ne povis lin bone gardi, kaj tial estas ŝia devo fari la vivon de Dezirito pli facila, pli bela.

Kaj ŝi decidis oferi tutan sian vivon por la ĝiba filo kaj ŝi sciigis la reĝon pri sia decido.

Malproksime, malproksime de l' reĝolanda ĉefurbo, sur floriĉa bordo de suda maro, la reĝino havis kastelon, hereditan de l' patro, en tiun ĉi kastelon ŝi decidis foriĝi kun la malgranda filo.

Ŝi volis, ke en la bela suda lando, malproksime de la kortego, ŝia filo elkresku nesciante sian malfeliĉon.

Ŝi foriĝos kaj kaŝos sin en la kastelo kun kelkaj fidelaj servistoj, kiuj scios pri ŝia intenco. Tie ŝi povos ne rimarkigi al la filo lian kriplecon kaj faros lin feliĉa.



La reĝon kaj la pli maljunan reĝidon ŝia decido tre malgajigis.

— Ĉu povas esti, — diris ili, — ke krom la filo-kriplulo neniu estas kara al vi ? Ni petegas vin ne disigi la familion.

Sed la reĝino estis neŝanceblebla.

— Mi estas la kaŭzinto de lia kripleco, mi do devas fari lin feliĉa.

Antaŭ forveturo la reĝino kunvokis siajn fidelajn servistojn kaj diris al ili :

— Mi forlasas mian edzon kaj filon-junulon, mi forlasas mian propran feliĉon por la feliĉo de mia malgranda filo, kaj vi, miaj fidelaj servistoj, devas min helpi. Mia filo, mia amata, malfeliĉa filo ne devas scii pri sia kripleco. Vi forgesu, ke li estas ĝiba kaj kaŝu tion al li.

La servistoj juris, ke ili agos laŭ la ordono de l'reĝino.

Venis la tempo de l'forveturo, la ŝipo estis jam tute preta por la vojaĝo, sed la reĝo kaj reĝido ne perdis ankoraŭ la esperon kaj ree petis la reĝinon, ke ŝi restu ; sed ŝi ne aŭskultis ilin kaj kun la infano en la brakoj ŝi supreniris la ferdekon, sekvata de la fidelaj servistoj.

La ŝipo fornaĝis. Kaj longe la reĝo kaj reĝido kun larmoplenaj okuloj rigardis la blankajn velojn de l'ŝipo forportanta la reĝinon en malproksiman sudan landon.

Post longa kaj laciga naĝado, kun mastoj rompitaĵ dum uraganoj, kun ĉifonitaj veloj, la ŝipo haltis apud floranta bordo, sur kiu staris la kastelo de l'reĝino.

Tiu kastelo estis bela, antikva konstruaĵo, kun nerompeblaj muroj, kun altaj turoj.

La kastelon ĉirkaŭadis fagaj arbaroj, oranĝaj kaj citronarabaj ĝardenoj, kaj ĉion baris altaj, netraigeblaj muroj. Nur de la kastelaj turoj kaj de la larĝaj terasoj oni povis vidi malproksimajn montojn kaj la senliman ebenon de l'maro.

En tiun ĉi kastelon foriĝis de la mondo la reĝino kun la filo-etulo.

La reĝido kreskis en la mira suda lando, sub radioj de saniga suno, lin ĉirkaŭblovdadis freŝa mara vento, kaj li estis tre sana, por granda ĝojo de l'patrino.

Malgraŭ sia ĝibeco, li, havante nur ok jarojn, estis jam tiel forta kaj lerta, ke li sukcese vetkuradis kun sia vartisto Kazo, kaj sagojn li pafadis tiel trafe, ke li povis mortigi altflugantan vulturon. Reĝido-Ĝibulo estis feliĉa :

la ŝuno, la blua ĉielo, la sudaj noktoj kun grandaj brilaj steloj naskis ĝojon en lia animo. Li kreskis, havante nenian imagon aŭ penson pri sia kriplesco.

Kaj kiel do li povus pensi pri ĝi? . . . La patrino kun ravo kaj admiro lin rigardis, la fidelaj servistoj nomis lin ne alie ol « belulo », « plej bela el la beluloj »; el la kastelo estis forigitaj la speguloj kaj ĉiuj poluritaj objektoj, en la parko kaj en la ĝardenoj la bordoj de la lagoj kaj cisternoj estis tiel baritaj, ke la ĝiba reĝido ne povis vidi sin sur la supraĵo de l' akvo.

La reĝino antaŭvidis, ŝajne, ĉiujn akcidentojn, kaj defendis de ili la filon.

El la malproksima patrujo alnaĝantaj ŝipoj alportadis iafoje leterojn de la reĝo.

« Min turmentegas la disiĝo, — skribis li, — revenu, ho kara! Se regnestraj zorgoj min ne detenus, mi mem flugus al vi; sed devoj alligas min al la patrujo . . . Revenu do, kara! »

— « Mi dediĉis min al la feliĉo de mia filo, mi atingis mian celon, li estas feliĉa. Ĉu nun mi devas reveni kun li al la mondo kaj rompi lian feliĉon? Ne, neniam, neniam! »

Kaj la reĝino kontentiĝis per ĉiutaga vizitado de granda salono, en kiu troviĝis portretoj de l' reĝo kaj de la pli maljuna filo, kaj ŝi longe ilin rigardis; kune kun ŝi rigardis ilin reĝido Dezirito. Unufoje li demandis la patrinon:

— Diru al mi, ĉu la patro kaj frato estas tiel bonaj, kiel belaj?

— Ho jes, — respondis la reĝino.

— Kaj ili nin amas?

— Certe, ili amas nin.

— Kial do ili ne sendas al ni ŝipon, por ke ni revenu al ili? Kial ni loĝas malproksime de ili, kvazaŭ ekzilitoj?

Tiuj ĉi vortoj ektimigis la reĝinon.

— Ĉu al vi ne estas bone loĝi ĉi-tie kun mi, mia kara, mia sole amata?

— Bone, sed . . .

Kaj la reĝido ekmeditis.

« Li enuas », — pensis la reĝino kun teruro.

La reĝido ne havis ankoraŭ dek jarojn, kiam la patrino rimarkis, ke li atente aŭskultas la kantojn de birdoj, la mal-

proksiman plaŭdadon de la maro, la bruon de la vento en arboj, kaj penas per propramane farita kana trumpeto imiti tiujn ĉi sonojn.

— Li estas muzikisto! — ekkriis la reĝino. — La muziko... jen en kio estas lia feliĉo!

Kaj baldaŭ la reĝido havis fluton, harpon, liuton... Kaj apenaŭ liaj fingroj tuŝetis la muzikilojn, aŭdiĝis ravantaj sonoj, kaj li mem kantis, kaj lia kanto estis belega.

— Jen estas lia feliĉo! — parolis la reĝino.

Jes, tio ĉi estis feliĉo, sed feliĉo de malliberulo; en la sonoj la reĝido senkonscie esprimadis sian sopiron pri libereco. Li ankoraŭ ne sciis, kio estas libereco, sed li kantis himnon al ĝi. Kaj lia kanto estis tiel bela, ke la birdoj alflugadis ĝin aŭskulti.

Tiu ĉi kanto estis feliĉo de malliberulo. Ju pli maturiĝis la reĝido, des pli la soleco kaj mallibero lin turmentis. Lia animo volis flugi al bela malproksimaĵo, kiun li vidis de la terasoj kaj turoj, al la bluiĝantaj supraĵoj de la montoj, al la brila, bruanta maro.

— Kial, — demandis li la patrino, — mi ne povas forlasi tiujn ĉi murojn? Ĉu ili estas ensorĉitaj? De malproksime mi vidas maron, jen brilan kaj ridantan, jen malluman kaj minacan, mi amas ĝin, ĝi vekis kanton en mia animo, mi volas iri al ĝi!

— Sed ĝi estas danĝera, mia filo.

— Mi estas kuraĝa kaj ne timas danĝerojn.

— Ne, ne, ne eliru el inter tiuj ĉi muroj, Dezirito; ili estas ensorĉitaj.

Kaj la reĝino ordonis al la servistoj gardi ĉiujn enirejojn kaj elirejojn de l'kastelo.

Sed la senlima malproksimaĵo kaj la ondanta ebena de la maro allogadis la reĝidon, kaj ĉiam pli ofte li supreniradis la turojn kaj altajn terasojn, kaj lia animo esprimadis siajn sentojn en sonoj.

Matene antaŭ la leviĝo de l'suno, kaj vespere antaŭ ĝia subiro, la ĝiba reĝido, preninte liuton, kantis belan himnon al la lumigilo de l'mondo. La sonoj de tiu ĉi kanto tremis en l'aero, flugis malproksimen, malproksimen, kaj homoj aŭskultis ilin kun koro rapide batanta kaj volis plori pri fremda mizero, plori kaj preĝi.

Disvastiĝis en tiu lando la famo; oni komencis paroli

pri la malnova reĝa kastelo. Staris ĝi multajn jarojn, ĉirkaŭita per netraigeblaj muroj, kaj neniu sciis, ĉu iu loĝas en ĝi. Nur laŭ fajretoj, brilantaj iafoje en fenestroj, oni divenis, ke en la kastelo estas homoj. Sed ĝi estis tiel silenta, tiu ĉi kastelo, kaj tiel majesta en sia silento, kaj jen subite tiaj sonoj! . . .

El urboj, el vilaĝoj komencis la homoj venadi al la muroj de la kastelo, por aŭdi la ravan kanton de la nekonata artisto.

La terason, kiel ĉion en la kastelo, ĉirkaŭis alta balustrado. De post ĝi la reĝido povis vidi nur la malproksimon; sed tion, kio estis apud la muroj, li ne vidis, li aŭdis nur mallaŭtigitan bruon de homaj voĉoj, aŭdis laŭdojn pri sia kanto, kaj lia koro ĝojis, pleniĝante je fiereco.

Kiel li volus ekvidi tiujn ĉi homojn! Sed la muro estas alta, glata, sen ia fendeto. Tamen la juna reĝido ne mal-esperis: li ĉirkaŭiris la muron unu fojon, duan, kaj rimarkis fine, ke unu ŝtono iom elstaras.

La reĝido estis forta kaj lerta, li puŝis la ŝtonon kaj sen helpo de iaj ajn iloj, per solaj manoj li eligis ĝin kaj faris malgrandan fendon.

Li ekrigardis. Jen kia estas ĝi, tiu ĉi popolamaso! Li ekvidis ĝin en tuta ĝia diverseco. Kiom da junaj, belaj, entuziasmaj vizaĝoj!

Kaj jen tie . . . kia rava vidaĵo! . . . Knabino blanka, kiel lilio, kun belaj brilaj okuloj, levitaj supren. Kion serĉas ŝi en la ŝtonoj de l' balustrado? Eble ŝi esperas vidi la kantiston?

— Mi estas tie ĉi, — pense diris al ŝi la reĝido; — rigardu ĉi-tien!

Subite iliaj rigardoj renkontiĝis kaj la knabino ekridetis al la reĝido.

De tiam ĉiutage en la radioj de l' hela suno li vidis ŝin, kiun li nomis Lilio, kaj ili interŝanĝis ridetojn.

La popolamaso malsupre ĉiam kreskis, sed la reĝino ne maltrankviliĝis.

« Li sin amuzu, — ŝi pensis, — lia feliĉo estas mia feliĉo; la muroj ja estas netraigeblaj, netraigeblaj . . . »

Sed jen unufoje, kiam la reĝido ekkantis novan kanton, verkitan por ŝi, kiun li nomis Lilio, milhoma amaso ekkriis:



— Poeto bela ! kantisto mirinda ! ni volas vin vidi !  
Eliru ! Ne nur via voĉo, tuta vi estas bela ; eliru do sur  
la muron, ni volas vin vidi, ni volas vin saluti !

Kaj inter la miloj de homaj voĉoj li divenis kaj re-  
konis la voĉon de Lilio :

— Mi volas vin vidi . . . .

Tiam senmedite li surgrimpis la muron kaj ekstaris  
antaŭ la popolo.

Li estis kutimiĝinta al la penso, ke li estas bela ; kaj  
tial li staris en fiera pozo de belulo kaj venkinto.

*El la rusa lingvo tradukis*

*(Fino en la venonta numero.)*

GEORGO DEŜKIN.

---

## FELIETONO

---

### *Ĉiama lumo.*

*Ekvenas krepusko, kaj la birdo kantas,  
Printempo kaj nokto al la ter' alportas  
Floron bonodoran, kaj la stelon helan,  
Kaj la homo dankas naturon la belan.*

*Kuraĝe, kiel ĝi, ni restas starante,  
Kontraŭ la ventego arbojn faligante,  
Kaj ju pli potenca estos malamiko,  
Des pli glorioplena iĝos nia venko.*

*Subite la nubo, helpata de vento,  
Ĉion minacante, per terura forto  
Provas sur kamparo ombraĵon trameli.  
Sed tamen la stelo daŭrigas brileti.*

*Kaj tiu steleto donos al ni fidon  
Necesan por venki la morgaŭan mondon.  
De l' tempo de Paco gardistoj tre viglaj  
Al la Verda Stelo ni restos fidelaj !*

*Robert Bollack.*

---

### La admirinda aerveturilo.

Estis bela lando kun belegaj arbaroj, ĉarmaj lagoj kaj maroj  
kaj fruktodonaj kampoj, sed ankaŭ kun grandegaj montaroj. Tiu  
ĉi lando estis nomata « Mondo ». Inter tiu ĉi montaroj loĝis kre-  
aĵoj, nomataj « homoj ». Unuj homoj nun vidis la fruktodonajn  
ĝardenojn de la aliaj, kaj aliaj povis rigardi la belajn lagojn kaj  
riverojn de la unuaj. Nun la homoj deziris viziti la landon de la  
aliaj. Sed neeble ! La montaroj estis nepaseblaj. Malĝoja nun  
estis la homaro kaj fariĝis pli kaj pli malfeliĉa. Sed en tiu ĉi  
malfacilaĵo ekvenis savanto. Viro kun bonega koro donacis al la  
homaro aerveturilon. Nun la homaro fariĝis ĝojega. La montaroj  
ne plu estis baroj. Facile oni vojaĝis de lando al lando. Ofte  
kaj admirante la homoj rigardis la veturilon. Iam diris unu el

ili : « La maŝino estas tre malgracia. Mi scias, kiel oni povas pli-bonigi ĝin ! » Kaj li prenis tranĉilon kaj graciigis la movilon. Sed la flugilo nun estis pli malpraktika kaj nun ree diris la saĝaĉulo : « La postaĵo estas tro peza, ni devas malpezigi la flugilon ! » Kaj li forigis la postaĵon. Sed ho ve ! Tiam la maŝino tute ne flugis. La homoj denove estis malfeliĉaj.

ARTUR ZICKLER (14-jara).

## BIBLIOGRAFIO

*La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

**Tri mortoj**, de LEO TOLSTOJ, kun permeso de la aŭtoro tradukis M. ŜIDLOVSKAJA. 24 p. 13 × 19. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo : 40 centimoj (0,16 Sm.).

Tiu ĉi belega rakonto de la glora verkisto estas aparta represaĵo el « Lingvo Internacia » kaj estas ornamita per la portreto de Tolstoj.

**Kara Panjo**, komedieto en unu akto de WALTER GORDON, el la angla lingvo tradukis GEGO. 35 p. 11 × 17. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo : fr. 0,75 (Sm. 0,30).

Ni varme rekomendas la legon de tiu ĉi tre amuza, sprita komedio, kiu estas ludinda, bonstila kaj tradukita en bona Esperanto.

**Genezo**, el la Biblio, el la originalo tradukis D-ro L. L. ZAMENHOF. 120 p. 15 × 21. — Hachette & C<sup>ie</sup>, 79, boulevard Saint-Germain, Paris. Prezo : 2 fr. (0,80 Sm.).

Tiu ĉi tre altvalora verko, tradukita de nia glora Majstro mem, estas aparta represaĵo el « La Revuo ».

**Taglibro de Barono Hans von Grotewill**, laŭ la germana teksto de FEDOR FREUND esperantlingve prilaboris ARNOLD BEHRENDT. 32 p. 13 × 19. — Notoj pri la « Internacia Ekspozicio por Vojaĝo kaj Turismo » okazanta en Berlino, de la 1-a de Aprilo ĝis la 20-a de Junio 1911, en la Ekspoziciaj Haloj de la Zoologia Ĝardeno.

**Elementoj de la Geometrio Absoluta**, verkis D-ro CYRILLO VÖRÖS, profesoro. 106 p. 16 × 24. — Libredonejo Ludoviko Kókai, Károly-utca 1, Budapest IV. Prezo : 2 Sm.

Scienca verko, tre rekomendinda al geometriamantoj.

**Le problème de la langue internationale**, par E. BOIRAC, Recteur de l'Académie de Dijon. 16 p. 13 × 19. — Paris, Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Prezo : 25 centimoj.

Bonega franclingva verketo de la prezidanto de nia Lingva Komitato ; ĝi estas eltirajo el la franca scienca revuo « Revue Pédagogique », 15. Jan. 1911.

## PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

**Jungi.** (Responde al S-ro O. N.) — « Jungi » signifas : alfiksi per specialaj iloj iun beston al la tirota veturilo aŭ alia objekto, ekz. : jungi ĉevalon al kaleŝo. Senutile estas diri : « aljungi », ĉar ĝi signifas : jungi al la sama veturilo, al kiu jam estas jungita(j) ankaŭ alia(j) besto(j). Mi vidis jam ankaŭ la vorton « enjungi » ; ĝi ankaŭ ne

estas malbona, ĝi ŝajnas esprimi, ke la jungbesto estu *ĉirkaŭata* de la jungiloj, ĝi do estu *en* ili. Kompreneble, la simpla « jungi » tute precize esprimas la ideon, ne estas do necese aldoni iun senrolan pozicion. — « Ĉesigi la jungstatojn » oni plej logike esprimas per la vorto « maljungo » (komp. butonumi - malbutonumi, kovri - malkovri, k. a.), sed ankaŭ la vorto « dejungo » bone taŭgas, ĉar reale, la procedo de la maljungo estas sama (en returnita senco), kiel tiu de la jungo (komp. kroĉi, malkroĉi, de kroĉi). « Eljungo » ankaŭ ne estas malbona; ĝi estas la malo de « enjungo ».

P. DE L.

*Pri aliaj lingvaj demandoj ni parolos en la venonta numero.*

## HUMORAĴOJ

**Ekstrema distreco.** — Profesoro Distriĉ eniras en la klason. La lernantoj estas farantaj grandan bruon, babiladon, ridadon; ili ne rimarkas la profesoron. « Kio okazas tie ĉi? » krias kolere la profesoro. La lernantoj surprizitaj eksilentas kaj diskuras.

La profesoro kaptas la plej laŭte bruinton je lia kolumo. La kaptito estas la filo de l'profesoro Distriĉ mem.

— Diru vian nomon! — diras kolere la profesoro.

— Distriĉ, — respondas la filo iom mirigita pro tiu demando.

— Distriĉ... Distriĉ... — murmuris la profesoro, — Distriĉ... tiu nomo ŝajnas al mi konata... Distriĉ, Distriĉ... mi jam aŭdis iam tiun ĉi nomon... Distriĉ, Distriĉ... ha jes! nun mi jam memoras! mia patro estis ankaŭ tiel nomata!

**Ne estas peninde.** — *Filo* (5-jara): Patro, aĉetu por mi dento-bruson, por ke mi povu purigi miajn dentojn. — *Patro*: Ne estas peninde purigi ilin; ili estas laktodentoj, ili ja elfalos.

**Nevola ofendo.** — La kolonelo vizitonta alproksimiĝas. Sinjoro leŭtenanto devas raportu al li pri la nombro de la ĉeestantoj en la soldata lernejo. — *Leŭtenanto* (al la serĝento): Kiom da kampuloj? — *Serĝento* (servofervore): Tridek-tri, kune kun vi, sinjoro leŭtenanto.

**Laŭvorte.** — *Poetaĉo*: Mi esperas, sinjoro redaktoro, ke mia poemo, kies manuskripto mi sendis al vi hieraŭ, plaĉas al vi. Ĝi ja estas plena je entuziasmo, je amo brulanta, flamanta... — *Redaktoro*: Vi estas prava: ĝi jam forbrulis inter la flamoj.

**Kalkulo.** — *Instruisto*: Se unu poŝtuko kostas unu spescenton, kiom kostas dekdu poŝtukoj? — *Lernanto* (filo de komercisto): Unu spesmilon kaj ok spesdekojn. — *Instruisto*: He, atentigu; ili devas kosti unu spesmilon kaj du spescentojn. — *Lernanto*: Ne, sinjoro, ĉar podekduaj aĉetantoj ĝuas 10%-an rabaton.

**Solecamanto.** — *A.*: Ha, kiel senpacience mi atendas la someron! la varman someron, la sezonon de l'vivo, la kelksemajnan libertempon! Jes, la libertempon, la feliĉigajn tagojn, kiujn mi pasigos ekster Parizo, ekster tiu ĉi bruega urbo, en malgranda vilaĝo, en la angulo de arbareto, en la soleco, kie mi vidas neniu, en la soleco, kie mi senege kaj plezure povos min transdoni al miaj pensoj, en la soleco, malproksime de la bruado de la ĉiutaga profana vivo, en la soleco, kie... — *B.*: Ha, amiko, vi min entuziasmigis pri la soleco! Sciu, ke mi ankaŭ adoras la solecon, ĝuste kiel vi! ho, mi ankaŭ sopiras la solecon, ĝuste kiel vi! mi ankaŭ deziras pasigi mian libertempon en malgranda vilaĝo, en soleco, ĝuste kiel vi! Amiko, ni estas samideanoj, ni pasigu nian libertempon *kune!*



## NIAJ KONKURSOJ

*Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 S, — 2) samon en valoro de 1 S, — laŭ elekto de la premiotoj.*

**Pri nia antaŭlasta konkurso.** — Jen la nomaro de 1 juĝintoj : F-ino Ireno Abray, Aglido, Altkreskulo, Th. Arndt, Antono Balogh, G. Bauer, S. M. Bauer, L. Begli, S. Birre, Blondulino, Johano Bont, Boucon, M. Boy, Maurice Brezin, Louis Brioux, Brunulino, P. Ch—r, V. Cimr, Josefo S. y Coll, Luigi Cornaro, Ladislao Dorai, Karl Dudinsky, Ch. Durand, M. Eisler, J. W. Elie, Ph. Ellbogen, Alb. Fahrner, Francisko kaj Stefano Fekete, F-ino Th. Fentey, D-ro A. Fišer, Fuŝproblemisto, Grafino Y. G., F-ino Rose Garnier, A. Gaubi, Carl Julius Geseller, Edm. Gette, V. N. Gibeaux, Go-fo-do, L. Goldstein, J. González, F-ino L. Hall, Hazardulo, R. Hedborg, \* K. Herner, S. Hiller, Hen-Lŭa-Dzing, J. H. Irrig, F-ino Ottilia Istre, Mladen Ivešić, Max Jahn, Adolf Jellinek, Juĝemulo, Voldemaro Jerebcov, Karolino, Wilh. Kellner, S-ino Killer-Rosenzweig, \* Lukas Knoll, Anatol Koh, Joh. Kovács, Georgo Kővágó, Jos. Kramer, Sam. Krietsch, F-ino A. Latour, A. Leitner, S-ino L. Lemberger, Paul Jules Lengyel, F-ino Vilma Lengyel, F-ino Tilda Lenk, Moritz Lindner, S-ino Lock, J. Luber, Johano de Luczenbacher, V. I. Maat, Umberto Mattioni, Mevido, F-ino Odette Meyer, S-ino M. Meylan-Mairet, Baltazaro Mind, Gy. Molnár, L. Müller, \* Otello Nanni, Em. I. Nicolescu, P. Noyers, Jos. kaj W. Oberländer, R. Odinot, Leo Orth, Rudolf Oesterreicher, Nikolaj Pečigargov, G. Peterson, F-ino Rose Petitjean, Jakobo Pirkner, Jos. Polgár, Emile kaj Marcel Prisier, Ivan Probojčević, F-ino V. Proksch, Pupinjo, Herm. Quittner, Lud. Rauschenberger, Hugo Regéczy, Richier, E. Richter, W. Ringbauer, Em. Robert, Sigm. Romanowski, Rululo, L. F. S., Karl Sauter, Karl Schaffler, W. Schwartz, Serĉulo, Skarabido, Henryk Skinder, \* N. de Sitte, Josefo Solsona, W. Sovinec, Alois Stoll, Antono Studer, Herm. Suttinger, M. Szentesy, D. de Szentmáriay, Elemér Szikszay, Tamburisto, P. Taussig, A. Teodorovič, Giovanni Torr, L. Unger, M. Untermüller, Zoltano Varsányi, Nikolao Vrutti, F. Weinberger, Hans Wollner, X-y-z, Wilh. Zasche, Zigzagulo, N. D. Zwingler. — Du leteroj (el Italujo kaj el Rusujo) estis nelegeble subskribitaj; unu (el Rusujo) ne estis subskribita. Kvar leterojn ni ricevis post la fermo de la juĝado, — ilin ni ne povis aldoni al la aliaj; la nomoj de iliaj sendintoj estas markitaj per \* steletoj en la ĉi-supra nomaro.

**Pri nia februara konkurso** ni ricevis 33 respondojn, de 26 personoj. La unuan premion gajnis S-ino Killer-Rosenzweig (100-vorta respondo) la duan S-ro A. Teodorovič (27-v. r.). — La nomaron de la partoprenintoj, kune kun iliaj respondoj, ni publikigos en la junia numero.

*Rimarko.* — Ni forgesis diri en nia lasta numero, ke la templimo de nia aprila konkurso estas la 1-a de Julio 1911.

### Korespondado de la Redakcio.

S. W. (M—n.) — Se, ĉe la subskribo de iu artikolo ne estas montrite, ke ĝi estas *tradukita*: tio signifas, ke ĝi estas originale verkita de la subskribinto en Esperanto.

L. H. (Mohilev-Pod.) — Via lasta konkursa respondo ne estas konforma al la problemoj; ĉiu vorto de la sama frazo devas enhavi saman vokalon (aŭ *a*, aŭ *e*, aŭ *i*, aŭ *o*, aŭ *u*). Via respondo ne estas do akceptebla; vi povas sendi alian, vi ja havas ankoraŭ tempon.

*Presotaj verkoj*: Tri; Ĉe maro; El la pensoj de Tolstoj; Deziro de la diakono; La diablo kaj lia helpanto; Folioj printempaj ekfloris.